# *La provinco Ciego de Ávila transiras al rekuperiga fazo de Covid-19*

Image not found or type unknown

Havano, nov 14 (RHK) La registara laborgrupo por fronti la Covid-19 en Kubo decidis ke la centra provinco Ciego de Ávila transiru al la rekuperiga fazo pro la rezultoj atingitaj en la kontrolo de Sars-Cov-2.

Dum kunsido prezidita de la insula ?tatestro Miguel Díaz-Canel, oni konstatis ke la ?efa municipo restos en la nomata dua fazo, dum la ceteraj municipoj de la provinco transiras al la tria fazo.

La ?efministo Manuel Marrero alvokis la provincon ne malaltigi la atenton kaj strikte plenumi la regulojn por eviti konta?on kun la viruso, kiel uzo de protekta masko, purigado de manoj kaj surfacoj kaj eviti homamasojn.

“Ni ne povas luksi je retroiro post tiu ?i longa laboro kaj periodo de batalo kontra? tiu ?i situacio”, li emfazis.

Siaflanke, la ministrino pri edukado, Ena Elsa Velázquez, klarigis ke tiu teritorio pretas por repreni la lernejan kurson 2019-2020 la venontan 16-an de novembro, kaj komencos la akademian ciklon 2020-2021, la 7-an de decembro.

En la kunsido oni anka? analizis la situacion de la orienta provinco Santiago de Kubo, kiu konfirmis 10 kazojn de Covid-19, post kelkaj monatoj de kontrolo de la kronviruso.

Oni anka? pritaksis la dama?ojn de la tropika ?tormo Eta en la teritorio. En la unuaj kalkuloj estis informite ke pli  ol 700 domoj estis iel dama?itaj, anka? parto de la voja infrakstrukturo, ?efe en la montaraj zonoj, kaj la sektoro de agrikulturo, kun dama?oj en 12 mil hektaroj, en kultivoj de banano, rizo, vegetaloj kaj tabako.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/239694-la-provinco-ciego-de-avila-transiras-al-rekuperiga-fazo-de-covid-19

Radio Habana Cuba